


DIA REGNO
ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✧ dumonata kristana revuo en esperanto ✧ n-ro 1 (850) ✧ 2005 ✧



La 17-a ekumena kongreso 2005
en Hungario

KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta
kun UEA**

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021;
✉ keli@chez.com

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
☎ +31 1724 20222;
✉ e.a.vandijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
☎ +49 7131 162688;
✉ SLKrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume
€20,- ☛ Membro-subtenanto €30,- ☛ Nura abono:
pagante rekte al KELI €16,- ☛ pagante al Libroservo
€18,- ☛ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per
registrita letero al la kasisto de KELI. ☛ Se estas en
via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA)
bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de
KELI ☛ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Heimdalsvägen 24,
S 149 32 Nynäshamn, Svedio;
☎ +46 (8) 52016816;
✉ dr_board@yahoo.se

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ
traduko oni sendu al la redaktoro.*

Ekspedado: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10

✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
☎ +420 325 615 651;
✉ Cea.polnicky@quick.cz

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

ENHAVO

Antaŭ ni nova jaro...	3
Jen ni estas atendataj	
Kion prezentos al ni la 17-a Ekumena Kongreso?	4
La kalendaro de la abato	6
Ekumeno + antaŭparolo	8
La profilo	10
Kongresa aliĝilo	11
Listo de kongresaj partoprenontoj	15
Kristnaska celebrado en Aŭvernjo	16
Ĉu ni komuniku retletere?	18
La Mastro de l'Ringoj kaj la fido kristana	19
Mi estas kiu estas	21
Informetoj	23
Ĉar vi elektis ...	24

REDAKTORAJ VORTOJ

Ekde januaro 2005 mi transprenis la
taskon redakti *Dia Regno*-n. Tio
influos nian *Dia Regno*-n en diversaj
manieroj. Eble tiuj ŝanĝoj plaĉos al vi,
eble ne. Reagu kaj ankaŭ informu min
por ke mi povu plibonigi tion, kio ne
estas bona kaj evoluigi la alion!
Grandege vi helpas min per sendi
kontribuaĵojn kaj proponojn al mi.
Via kontribuaĵo, kia ajn, estas necesa
por ke la gazeto reprezentu nian
movadon. Por ke vi iomete pli bone
ekonu vian novan redaktoron, mi
mallonge prezentas min sur paĝo 10.
Mi intencas tiel en sinsekvaj numeroj
prezenti la estraranojn. En la jena kaj
la du sinsekvaj numeroj vi ankaŭ
trovos kontribuaĵojn, kiuj iel rilatas al
Hungario kaj nia ĉi-somera ekumena
kongreso. Venu kaj partoprenu!

Antaŭ ni nova jaro... Jen ni estas atendataj

Philippe COUSSON



Karaj gefratoj, antaŭ du monatoj, mi lasis al vi mian lastan mesaĝon kiel redaktoro de nia revuo, post 15 jaroj. Nun venas mia unua novjara mesaĝo kiel prezidanto.

Mi proponas al vi rigardi antaŭen. Kien iru nia kristana esperantista movado? Kion ni celu? Niaj statutoj havas en lasta analizo du paralelajn celojn: proklami la Evangelion al la Esperantistoj kaj proponi Esperanton al la kristanoj. Kvankam tiuj ŝajnas efektive paralelaj, ili efektive ne estas samvaloraj, ĉar por ni certe ne egalvaloras nia esperantisteco kaj nia kristaneco. Nia kristana vivo tiel valoras, ke ni volas vivi ĝin ankaŭ en esperantistaj kadro kaj etoso.

Nun, kio efektive ekzistas? La kongresoj kaj la revuo, ne parolante pri kelkaj personaj iniciatoj, eldonado aŭ diakonia laboro. Kiel tio respondas al niaj celoj? Kongresoj, tio estas komuna kristana vivo per Esperanto, tio estas ankaŭ kaj atesto pri kristanismo antaŭ esperantistoj kaj atesto pri Esperanto antaŭ kristanoj. Tiujn lastajn elementojn ni devus substreki en niaj kongresoj.

Dia Regno, nia revuo, kompreneble estas uzata kiel ligilo inter ni. Ĝi ankaŭ estas montrofenestro de kristanismo en esperantismo kaj de esperantismo en

kristanismo. Ni devas kaj koncepti ĝin kaj uzi ĝin kun tiuj celoj, apud la ligila celo.

Ni havis dum multaj jaroj, dank'al la giganta laboro de Karl Olof Sandgren (persona iniciato) la tiel nomatan *Esperanto-Misio*-n. Nun ĝi troviĝas en tre malbona situacio, sen respondeculo, sen volo, sen elano. Ĝi tamen trafus unu el niaj celoj. Ni devas do pripensi kiamaniere, ĉu same, ĉu alimaniere, plenumi ankaŭ tiun nian celon.

Mi tamen forgesis la diversajn Esperanto-Diservojn kaj la kunvenojn en la Universala Kongreso. Krom la ĉefa celo de Diservo, kiu estas glori kaj laŭdi Dion, la Diservoj utilas ankaŭ al la du menciitaj celoj, prezenti Esperanton al kristanoj kaj la Evangelion al la esperantistoj.

Sed, kion efektive ni prezentas dum la diversaj okazoj, kiuj troviĝas antaŭ ni. Ĉu vere Esperanton aŭ la Evangelion? Ĉu plejofte ni ne prezentas... KELI-n, tio estas nin mem. Ekzemplo estas niaj (kiam ili ekzistas) flugfolioj. Al la esperantistoj, ni devus prezenti la Evangelion, Kriston. Ni certe estas esperantistoj, kiel ili, sed tio ne estas nia tuta vivo. Nia vivo troviĝas aliloke, en iu persono, al kies renkonto ni devas allogi niajn 'samideanojn'.

Al la kristanoj, ni devas humile prezenti la lingvon, kion ĝi permesas, la fratan etoson de niaj renkontiĝoj, la veron de niaj laŭdoj. Sufiĉe ofte Esperanto estas rifuzita pro la

kvazaŭreligia aspekto de esperantismo. Ni devas aserti ke Esperanto ne estas kromreligio por ni, sed rimedo uzebla ankaŭ por la Evangelio kaj por la gloro de Dio. Tamen, oni ne povas nei, ke la komunikado inter kristanoj el malsamaj lingvoj havas alian kvaliton kiam ĝi okazas per Esperanto, ol kiam ĝi okazas per iu nacia lingvo.

Ni do ĉiuj, kaj ne nur la estraranoj, devas pripensi, kiun estontecon ni volas por la kristana esperantismo, por KELI. Kaj kiamaniere efektiviĝi tion.

En la epistolo al la Galatoj, kiun ni studos en la kongreso, Paŭlo komencas la trian ĉapitron per tiuj fortaj vortoj:

“Ho malsaĝaj Galatoj, kiu vin ensorĉis?” Li riproĉas al ili la forgeson de la kompleta graco de Dio, kaj la emon iamaniere gajni la savon. Pro la savo ricevita per graco, ni sentu nin liberaj agi por Kristo ankaŭ per Esperanto. Esperanto povas ankaŭ porti la mesaĝon de la Evangelio kaj la gloron de Dio. Dum nia agado per kaj por Esperanto, ni ne devas forpreni niajn okulojn de nia Sinjoro kaj Savanto, kiu estas Jesuo Kristo, kaj certe ne Zamenhof. Aŭ ĉu mi pravus diri: Ho malsaĝaj kristanaj esperantistoj, kiu vin ensorĉis?

□



Kion prezentos al ni la 17-a Ekumena Kongreso?

kore atendas vin la kunlaborantoj de LKK.

Ekstere

La urbeto Piliscsaba [piliŝ ĉaba] situas en la montaro Pilis, ĉirkaŭas ĝin arbarkovritaj montetoj. La Danubo troviĝas kaj norde kaj oriente preskaŭ en la sama distanco, ĉar ĝuste tie estas la mirinda kurbigo de la riverego. Ĝi ŝanĝas la direkton de sia fluo en 90 grada angulo de oriento al sudo. En tiu "kubuto", en pitoreska regiono ni trovas jam el la unua jarcento de la hungara reĝlando belajn kaj valorajn historiajn restaĵojn.

En Esztergom estas renovigitaj kaj spekteblaj partoj de la unua reĝa sidejo, kie naskiĝis Sankta Stefano, la unua reĝo de Hungario (†1038). Kiuj interesiĝas pri historio kaj artoj, certe ĝuos la

mondfaman riĉan kolektaĵon de la Kristana Muzeo kaj la katedralon de Esztergom, la plej grandan preĝejon en Hungario. Tien ni faros duontagan ekskurson, laŭplane marde posttagmeze. Tion antaŭos mallonga prelego kun lumbildoj pri la plej gravaj vidindaĵoj.

Je invito de la reĝo benediktanoj jam de la jaro 1000 ekagadis en nia lando, iliaj lernejoj estas famaj kaj rekonataj. De 1200 ni jam trovas restaĵojn de monaĥejo kaj preĝejo de francaj cistercianoj, invititaj de la tiama francdevena reĝedzino, proksime al nia Piliscsaba.

Simile apud la Danubo, en Visegrád [viŝegrad] konstruigis por si palacon Karlo Roberto, la unua Anjou reĝo de

Hungario, kiu laŭ virin-branĉa parenceco sekvis post la originala Árpád dinastio (1301). Li iniciatis sistempe la Viŝegradan Kongreson (1335), kie la tri reĝoj de Ĉeĥio, Pollando kaj Hungario kontraktis pri dogan-unio inter siaj landoj. De tiam Viŝegrád fariĝis favorata reĝa ripozejo. Reĝo Sigismundo kaj poste reĝo Mathiaso evoluigis, kompletigis la palacon. El tiu, sistempe mondfama renesanca palaco nun multe estas spektebla apud la Danubo. Tiuj historiaj raraĵoj estas tute proksime, tiel, ke en iu ajn postagmanĝa paŭzo ili estas viziteblaj ankaŭ alternative.

Dum la turka regado (ĉ 1540 – 1690) la regiono kaj la vilaĝo mem multe suferis. Ĝia hungara loĝantaro preskaŭ tute pereis. Anstataŭ ili reĝino Maria Terezia (1740 – 1780) setligis ĉi tien germanajn kaj slovakajn familiojn. Ilian posteularon ni renkontas ankaŭ hodiaŭ en pluraj vilaĝoj en la montaro Pilis.

Ekde 1896 ekiris la trajno el la koro de Budapeŝto al la urbo Esztergom sur kiu linio troviĝas Piliscsaba. De tiam vigliĝis la evoluo de la vilaĝo kiel ripozejo. Oni disparceligis grundojn el la arbarkovritaj deklivoj por novaj loĝantoj kaj somerumantoj.

Post 1945 granda parto de la germana loĝantaro estis elhejmigita kaj anstataŭ ili loksidiĝis ĉi tien elhejmigitaj hungaroj el Ĉeĥoslovakio. Post 1956 – la hungara revolucio – en la du malnovajn kazernojn – anstataŭ la hungara soldataro – sovetaj trupoj loĝiĝis kaj tio determinis la sorton de la vilaĝo ĝis ilia foriro en 1991.

Post tio la estraro de la komunumo

transdonis la terenon por la hungara superagrada instruado. Tiel ricevis lokon en Piliscsaba la Katolika Universitato Pázmány Péter – “Pazmaneum”. Ĝiaj konstruaĵoj estas tute modernaj sed en iu interesa romantika stilo. Ilin ni povas rigardi ĉiutage, ĉar tute apude ni manĝos en ties manĝejo. La moderne ekipita studenta hejmo de la Universitato estas la t.n. Josephinum, kiu estos nia kongresejo.

Tuttagan ekskurson ni organizos aŭtobuse al Budapeŝto kiel kutime merkrede. Antaŭe okazos projekciado de lumbildoj pri ĉiuj vizitotaj lokoj. Verŝajne ni uzos tri aŭtobusojn, en ĉiuj ĉeestos respondecaj gvidantoj. Ĵaŭde vespere ni planas altnivelan muzikan programon, kaj vendrede okazos jam la adiaŭa vespero..

Enhave

En la kongresejo troviĝas bela romkatolika kapelo, kaj krom la loĝĉambroj kelkaj pli- malpli grandaj salonoj por silento, preĝado kaj meditado. Ni esperas, ke ĉio estas destinita por nia bono kaj ni travivos tie benon de nia Sinjoro.

Inter la jam aliĝintaj karaj gefratoj pluraj entreprenis kontribui per prelegoj, enkonduko de matenaj- vesperaj preĝoj, deklamado aŭ partopreno en junulara programo. Ni ĝojas, se vi ĉiuj venos tiel, ke vi pretas dividi tion, kion vi ricevis de la Sinjoro. Se vi venos kun malplena koro, ĉi tie atendante iun spiritan donacon, ankaŭ tiel estas bone, nur venu kun malfermita koro, ĉar la Sinjoro estas preta “*doni bonaĵojn al*

LA KALENDARO DE LA ABATO

Kiel estiĝis la kristana tempkalkulo

verkita de Peter Göpfert
tradukita de Siegfried Krüger

Robinson ĉarpentis grandan palison kaj entranĉis per sia tranĉilo: *“Ĉi tie alveninta la 30-an de septembro 1659”*. Al ĉi tiu dato li ĉiutage aldonis noĉon, ĉiun sepan tagon duoble longan kiel la ceteraj.

Ne nur la infanojn siaspece fascinas ĉi tiu raporto. Montriĝas parabole, ke la homo kapablas ordigi la tempon, uzante tempkalkulon. Tiel – kaj nur tiel – li ne estas senhelpa kontraŭ ĝia fluo.

La Robinson-rakonto simple montriĝas al la leganto, ke kondiĉo de ĉiu civilizacio estas la en jarmiloj akirita kapableco de la homo, nombri horojn, tagojn, semajnojn, monatojn kaj jarojn.

Estas raportite, ke Robinson Crusoe krucforme starigis datpalison ĉemare. Ĉu tia rimarko memoriĝu nin, ke al la civilizado de la homo apartenas la kristana tempkalkulo? Povas esti. Ĉiukaze ĝi estas kaŭzo pripensu la sencon, ke ankaŭ ni – kiel Robinson – uzas la kristanan tempkalkulon, se ni skribas jarnombrojn.

Gottfried Benn diris iam, ke por la homo de la 20-a jarcento novaj datoj eble estiĝis pli gravaj, ol tiuj *“kiuj per antaŭ kaj post vivas inter ni”*. Li

memorigas la 23-an de julio 1847, kiam Hermann Helmholtz formulis antaŭ la Berlina Fizika Societo kiel ĝeneralan naturleĝon, kion Robert Mayer eltrovis pri la konservado de la energio. Krome li memorigas la jaron 1859, kiam estis publikigita la teorio de Darwin. Ambaŭ datoj – tiel opinias Benn – estis donintaj novan epokon de la homaro sian kronologan bazon.

Se ni estus akceptintaj tion, ĝi signifus: ni vivas nun en la jaro 146 post Darwin aŭ en la jaro 158 post Helmholtz.

Tia pensludo instigas pripensi ankaŭ aliajn datojn de la pli nova historio: instali ilin kiel la jaron unu de la nova tempkalkulo. Ĉu eble la francan revolucion en 1789, aŭ la rusan en 1917? Kiel kun 1942: Fermi funkciigis la unuan nuklean reaktoron en

“Ĉi tie alveninta la 30-an de septembro 1659”.

Al ĉi tiu dato li ĉiutage aldonis noĉon, ĉiun sepan tagon duoble longa kiel la ceteraj.

Chicago? Kial ne 1945: la fondiĝo de UNO? Kio parolas kontraŭ 1969: la homo surpasas la lunon? Bedaŭrinde nur, ke ne ekzistas jaro, kiam komenciĝis la mondopaco, aŭ jaro, en kiu la malriĉeco el la mondo estis forigita.

Tiel denove aperas la demando, ĉu unu el la menciitaj okazaĵoj por la homaro estas pli grava ol la naskiĝo de Jesuo? Kompreneble iun tagon povus okazi, ke ie en la mondo oni decidus inventi novan tempkalkulon. Tia

elrigardo povas pripensigi nin, kion la estanta mondo dankas – se ne jam Jesuon mem – tiel al la post li aranĝitan tempkalkulon: Nur per ĝia ekesto ni disponas pri tempmezurilo, per kiu ĉiuj historiaj eventoj povas esti datigitaj, en kiu ajn kulturo aŭ loko de la mondo ili okazis.

Homoj, kiuj alkreskis kun la kristana tempkalkulo, verŝajne ne plu povas sekvi alian tempkonscion, kiu kalkulas la jarojn alimaniere: “*En la kvara jaro de la reĝo ... okazis, ke ...*”, aŭ pli simpla “*En la jaro de la storma tajdo ...*”, “*En la jaro de la granda tertremo ...*”.

Kiu nur tiel eksentas tempon, tiu nur parte povas evolui historian konscion. La unua momento por li estas mallarĝa insulo en la senlima oceano de la tempo, kiu ne estas superrigardebla, eĉ se ĝi nur estas mezurebla en horoj.

Marto 2005						
Lundo		7	14	21	28	
Mardo	1	8	15	22	29	
Mercredo	2	9	16	23	30	
Ĵaŭdo	3	10	17	24	31	
Vendredo	4	11	18	25		
Sabato	5	12	19	26		
Dimanĉo	6	13	20	27		

Homoj, kiuj alkreskis kun la kristana tempkalkulo, verŝajne ne plu povas sekvi alian tempkonscion, kiu kalkulas la jarojn alimaniere.

Certe, iom post iom estiĝas ankaŭ ĉi tie pli vasta historia konscio: Oni kalkulas

post olimpiado aŭ post la fondiĝo de la urbo Romo.

Sed la vasta, malferma kaj senpartia rigardo al la tuto de ĉiu homa historio, la kompreno de la tempo kiel linio, kiu etendiĝas senlime

antaŭen kaj malantaŭen, tio ĉio ne eblas ĉe tia limigita tempkalkulo. Nur en la jaro 526 romia abato kun la nomo Dionysius Exiguus – havis la ideon, estonte kalkuli la jarojn post la naskiĝo de Jesuo. Ni ne scias, kio la abaton instigis proponi la kristanan tempkalkulon al la mondo. Ĉiukaze li ne povis antaŭsenti la sekvojn por la ĝenerala temp- kaj histori-konscio de la homaro;

ankaŭ pro tio, ĉar nur malrapide la proponita tempkalkulo realigis.

Eĉ la romaj papoj uzis la jaran tempkalkulon post Kristo konsekvente nur ekde la 15-a jarcento. Ankoraŭ pli longe daŭris, ĝis kiam oni kontinuigis la kristanan jarkalkulon returne kaj inventis jarkalkulon antaŭ la naskiĝo de Kristo.

Hodiaŭ oni eble dum skribado de la jarnombro mirigite paŭzas kaj konstatas, ke la kristanismo jam tiel longe estas en la mondo. Eble ankaŭ venas la demando, ĉu la mondo, kiu tiel kalkulas, vere estas kristana mondo. Sed kiu tion pripensas skribante jarnombron, kiu rilatas al la historio de Jesuo el Nazareto, povus ankaŭ kompreni tion kiel promeson: Ankoraŭ ni kalkulas la jarojn post tiu jaro unu. Ĉar tio, kio komenciĝis en ĝi, atendas ankoraŭ la realiĝon.

Eble pro tio do estas la plej bone, celkonscie kaj memkompreneble – kiel Robinson sur la insulo – kaj optimisme kiel supozeble Dionysius Exiguus – uzi ankaŭ estonte la kristanan tempkalkulon. □

el la libro *Plugu al vi novan plugokampon...* (Alternativa teologio).
rigardu pri tio en Dia Regno 2003. 1 (838), p.12-14.

Antaŭparolo de Éva FARKAS-TATÁR

Esperantistaj kristanoj denove preparas sin por ekumena kongreso. Kun danko ni rememoras pri la unua tia kongreso en 1968, en Limburg/Lahn. Ĝi estis eksperimento, antaŭpreparita de multaj priparoloj, diskutoj kaj preĝoj. Por tiuj, kiuj deziris tion, ĝi estis sukceso kaj ĝojo, sed sekvis poste ankaŭ problemoj. Ambaŭflanke ekestis suspektoj, antaŭjuĝoj kaj aperis eĉ broŝuroj pri la danĝero de la ekumenismo.

Mi esperas, ke nuntempe ne estas kristanoj, kiuj pro tiuj kaŭzoj ne partoprenus ekumenajn kongresojn. Sed ankaŭ por tiuj, kiuj kun malfermita koro pretas kunestadi, mi rekomendas por meditado la suban artikolon de Jozefo Farkas, hungara reformita pastoro, el lia libro:

"Plugu al vi novan plugokampon..." (Jer. 4:3)

La Sankta Skribo ofte mencias la unuecon, la unuon. *"Estas unu korpo, kaj unu Spirito,... unu Sinjoro, unu fido, unu bapto, unu Dio kaj Patro de ĉiuj"* (Ef. 4:4-6). En sia lasta granda preĝo Jesuo denove petis, ke.. *"ili ĉiuj estu unu,...ili perfektigu en unu: por ke la mondo sciu, ke Vi min sendis"* (Joh. 17:21-23). Post dumil jaroj la disĉiploj de Jesuo ne nur ne *"perfektigis en unu"*, sed eĉ supraĵe ne povis trovi unuecon unu kun la aliaj.

Ni starigas nun iun konsternigan tezon por ke ni bibliece, sobre komprenu la taskon starantan antaŭ ni: la unuecon. La tezo estas: ankaŭ Jesuo

mem 'respondeas', ke liaj sekvantoj baldaŭ enfermiĝis en apartajn tendarojn. Antaŭ ol ŝokite

rifuzi tion, ni riprensu, ke en la personeco de Jesuo, la Nazareto tiel senmezure granda psika/spirita riĉeco aperis inter ni, ke tion neniu homido povas transpreni komplete. Ĉiuj liaj

sekvantoj nur 'laŭparte' heredis ion el la plena riĉeco de Jesuo Kristo: *"...ni konas laŭparte..."* (1 Kor. 13:12)... ne laste tiel ni konas ankaŭ pri Kristo. Ĉiu povas administri nur pri tiu heredaĵ-

” en Jesuo harmonie kunvivis la Torao-fideleco kaj la Torao-kritiko.

parto kiun li ricevis. Se ĉiu estintus duoble, kvinoble tiel fidela eĉ tiam ne povintus transpaŝi siajn barojn. Nur la kolektivo de la membroj, la *“tuta korpo”* (1 Kor. 12) kapablas prezenti la plenecon, la *“neesploreblan riĉon de Kristo”* (Ef. 3:8). El unu de la plej gravaj terenoj ni prezentas klarigan ekzemplon:

Multe diskutis la teologoj inter si kiamaniere rilatis Jesuo al la moseaj leĝoj, al la Torao. Mi ne detaligas nun ĉi tiun diskuton, mi resumas nur ĝian ĝisnunan rezulton: en Jesuo harmonie kunvivis la Torao-fideleco kaj la Torao-kritiko. Sufiĉas se ni zorge tradudadas la Montan Predikon (Mat. 5) jam ni trovas ĉi tiun duopan unuecon.

” neniu el ni povas realigi la tutan riĉecon de Jesuo Kristo, tial unuflanke ni devas esti fidelaj al nia heredaĵ-parto

Sed la disĉiploj jam ne povis senreste transpreni ĉi tiun duopan unuecon, kiu realiĝis en Jesuo. Tial okazis, ke en apartan tendaron kolektiĝis tiuj, kiuj


konfesis kaj proklamis lian fidelecon al la Torao kaj en alian tendaron kolektiĝis tiuj, kiuj konfesis kaj proklamis lian kritikon pri la Torao. La konfesantojn de la unua tendaro ni nomas judaistoj aŭ judkristanoj (kun apostolo Petro ĉepinte), tiujn, kiuj kolektiĝis en la alian tendaron ni nomas helenistoj (kun apostolo Paŭlo ĉepinte). La Biblio fidele raportas pri tio kiom multe ne povis iĝi unu ĉi tiuj

du tendaroj. Jam en la unua jarcento estintus aktuala la ekumena movado!

En la eklezio-historio kontinue estas sekvebla ĉi tiu unua fendo interne de la popolo de Kristo. Ankaŭ hodiaŭ estas 'leĝemuloj' kiuj faras el Jesuo duan Moseon, kaj estas aliaj, kiuj sub la egido de la 'libereco' ricevita de Jesuo Kristo, levas sin eĉ super la vortojn de Jesuo mem, ĉar ilin jam gvidas la Sankta Spirito.

Se ni zorge pripensadas ĉi tiujn faktojn, kiuj klare reliefiĝas el la historio, ni komprenas kio estas la esenco de la biblia 'unueco'. Ne tio, ke “ĉe mi estas la pleneco de Kristo, do, ĉiu ĉi tien al mi!” Sed: neniu el ni povas realigi la tutan riĉecon de Jesuo Kristo, tial unuflanke ni devas esti fidelaj al nia heredaĵ-parto, aliflanke ni devas ekkoni kaj rekoni la 'laŭpartan' veron, kiu efektiviĝas en la alia tendaro. *“Membroj”* ni estas de la *“unu korpo”* de Kristo (1 Kor. 12:12) kaj tio estas nia tasko, ke ni penadu *“konservi la unuecon de la Spirito en la ligilo de paco”* (Ef. 4:3). Tio estas la vojo de la biblicca, obeema, frateca ekumeno.

□



ESTRARANO KAJ NOVA REDAKTORO

LA PROFILO

Jen kelkaj vortoj pri mi

Profesie mi laboras en sveda aŭtoritato pri labormedio kaj precipe pri la interligo inter Tekniko-Homo-Organizo. En tiu profesio mi povas okupiĝi pri kaj tekniko kaj psiko-sociaj aferoj. La moderna profesia laborsituacio temas pri ĉiuj samtempe.

Libertempe mi nun interesiĝas pri komputilaj aferoj ekzemple kiel nova redaktoro pri kompostado per modernaj programoj. Sed mi ankaŭ interesiĝas pri lingvoj kaj plua faka studado.

Ŝatata kaj iomete humuriga karaktera trajto estas ke mi preskaŭ ĉiam devas iel desegni miajn pensojn por pli bone komprenigi al kolegoj kaj amikoj. Nur paroli ne estas mia talento. Bedaŭrinde ne ĉiam estas ilia plej ŝatata trajto atendi miajn bildojn. Pro tiu trajto mi ĉiam kunportas skribilojn en mia ĉemiza poŝo.

Interesajn travivaĵojn, inter multaj, mi spertis laborante en tute aliaj kulturoj. Inter alie en Albanio kie mi havis la bonŝancon labori kiel inĝeniero dum pli ol unu jaro. Tute alia lando kaj ankaŭ tute alia lingvo, tamen en Eŭropo. Simile grandan travivaĵon

mi spertis laborante en Somalio en rifuĝejoj dum 7 monatoj.

Persono kiu multe influis min kaj samtempe instruis al mi Esperanton, estis Olle Olsson. Li montris al mi la eblecojn pere de Esperanto viziti preskaŭ la tutan mondon. Malgraŭ lia instigo restas ankoraŭ multaj landoj kaj certe interesaj lokoj kiujn mi ne vizitis.

Inspirigan svedan libron mi trovis en ‘Kreski kiel plenkreskulo’. Ĝi ege simple montris ke ni devas daŭrigi nian kreskon ankaŭ post ni forlasis lernejon kaj nian gepatran hejmon. Sed kie ni trovu geinstruistojn aŭ modelojn? Ne tiel facile troveblaj. Aliajn interesajn librojn mi trovis en tiuj verkitaj de C.S. Lewis, la fama kristana kaj filozofia aŭtoro. Interalie li skribis la libron ‘Ĉu eblas esti kristano?’ kiu multe vekis mian iomete filozofian flankon.

Nun gravas por mi plibonigi mian esperantlingvan scion, kaj gramatike kaj vortare, ĉar alie estos malfacila tasko redakti Dia Regnon.

Aliloke en la jena numero mi donas al vi la eblecon kune kun mi pliriĉigi la modernan vortaron per



17-a Ekumena Kongreso
58-a de IKUE **55-a de KELI**
16 – 23 julio 2005
en Piliscsaba, Hungario

kune kun la **7-a JET**
7-a Junulara Ekumena Esperanto Tendaro

Karaj Gefratoj,

Hungaraj kristanoj denove kore invitas vin partopreni komunan kristanan kongreson en nia lando!

La loko Piliscsaba (pron.: piliŝ ĉaba) situas 25 km-jn nordokcidente de Budapeŝto apud la aŭtovojo 10, kaj ĉe la fervojlinio Budapest-Esztergom. Jam de la pratempoj ĝi estis loĝata.

En la bela arbara regiono jam el la mezepoko ni trovas restaĵojn, spurojn de vigla kristana vivo. Pro la agrabla ĉirkaŭaĵo ĝi fariĝis favorata ripozloko ekde la komenco de la antaŭa jarcento.

De dek jaroj tie ekfunkciis rekonata Romkatolika Universitato Pázmány Péter en interesaj, karakterizaj konstruaĵoj. Ties studenta hejmo estas la bela, moderna Josephinum kie ni kongresos.

Luteranoj, reformitoj kaj romkatolikoj ekzemplodone agadas en la komunumo, donante agrablan kristanan atmosferon al la tuta loko.

En ĉi tia hejmo ni estos kune en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu tion diras: *“Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi amos unu la alian.”* (Sta Johano 13:35)

Ni proponas por temo de niaj meditadoj, preĝoj kaj interparoladoj dum la kongreso:

Por libereco Kristo nin liberigis (Gal 5:1)
- la epistolo al la Galatoj por hodiaŭ

Ni esperas vian partoprenon en tiu kristana kunestado.

Ekumena Komisiono

Loka Kongresa Komitato

Dio benu!

Al la fervojstacio Piliscsaba (piliŝ ĉaba) iras trajno el la budapeŝta stacidomo Nyugati (okcidenta) el la mezo de la ĉefurbo.

Ankaŭ per aŭtobuso oni povas simple veturi tien al la direkto Esztergom, tra Dorog, de la aŭtobus-finhaltejo ĉe ponto Árpád.

Per aŭto sur la ŝoseo nro 10 la konstruaĵo troviĝas tuj post la kilometroŝtono 24.

La kongresejo estas studenta hejmo de la Universitato. Ĝi estas tute nova konstruaĵo komforte kaj bele ekipita. La ĉambroj estas 2 litaj kun propraj duŝejoj (sen viŝtukoj) kaj necesejoj. En la sama domo estas agrablaj tranoktejoj por pli ol 140 homoj.

En la studenta hejmo mem estas granda salono kun 150-160 sidlokoj kaj bona elektra orgeno. Krome estas pluraj malpli grandaj prelegejoj, kunvenejoj, kiujn ni povas uzi laŭbezone.

Belega granda kapelo atendas nin por diservoj, mesoj, komunaj preĝoj. Lifto funkcias kaj ĉio estas alirebla ankaŭ per rulseĝo.

Ni manĝos en la memserva restoracio de la Universitato, kie eĉ 200 homoj povas manĝi samtempe.

Ĉio, kio ĉirkaŭos nin estas preta servi por nia bono. Ni petu nian Sinjoron por beno, kaj preparu niajn korojn por akcepti tiun benon!

En la programo ni planas mesojn ĉiutage, preĝojn plurfoje tage, prelegojn, komunajn kantadojn, muzikajn vesperojn. Duontagan ekskurson ni faros al la proksima mondfama Kristana Muzeo en Esztergom. Okaze de la tuttaga aŭtobusa ekskurso ni vizitos multajn vidindaĵojn de Budapeŝto.

Ne forgesu kunporti vian Biblion kaj vian ADORU-libron, ĉar tiujn ni uzos dum la kongreso. Kiu ne posedas nian ekumenan kanton, ADORU, tiu povas aĉeti aŭ prunti ĝin en la kongresejo.

Vi akceptis per la apuda Aliĝilo la sekvontajn kotizojn:

Aliĝ-kotizo

ĝis 31 12 2004	A: 20,- EUR	B: 40,- EUR
ĝis 31 03 2005	A: 30,- EUR	B: 50,- EUR
ĝis 30 06 2005	A: 40,- EUR	B: 60,- EUR

Kongresa kotizo

A:	150,- EUR	B:	250,- EUR
Krompago por unulita ĉambro: + 50,- EUR			
Krompago por NE membroj de IKUE/KELI: + 20 EUR			

Gejunuloj:

A:	100,- EUR	B:	150,- EUR
----	-----------	----	-----------

ALIĜILO

Sendota al: **Párkányiné Kaszab Erzsébet**
H-1117 Budapest, Karinthy F. út 5. Hungario

Mi aliĝas al 17a Ekumena Kongreso 2005 en Piliscsaba, Hungario

Plena nomo: S-ro () S-ino () Persona nomo:

Familia nomo:

(bv. skribi Vian familian nomon MAJUSKLE kaj la personan minuskle)

Adreso:

Lando (en Esperanto):.....

Urbo/vilaĝo:..... Poŝtkodo:

Strato kaj numero:.....

Telefono:..... Faksnumero:.....

Retadreso:.....

Mi estas membro de IKUE () KELI ()

Mi deziras dividi la ĉambron kun:.....

Mi deziras loĝi sola: ()

Mi planas alveni je (dato kaj horo, se eblas):.....

Mi planas foriri je (dato kaj horo, se eblas):.....

Mi planas alveni per: aŭtomobilo (), trajno (), buso (), aviadilo ()

Mi NE mendas tranoktadon: ()

Mi mendas en la kongresejo nur manĝojn:

matenmanĝon (), tagmanĝon (), vespermanĝon ()

Mi estas vegetarano: () Mi bezonas alian dieton:.....

Naskiĝdato (nur por la junulara rabato):.....

Mi proponas jenajn kontribuojn al la kongresa programo:

Prelegon laŭ temo:.....

Programerojn por distra vespero:.....

Alian programeron:.....

La aliĝo validas post pago de minimume la aliĝ-sumo.

Mi pagis (sendis) la sumon deje la al

banka konto de:

Párkányiné Kaszab Erzsébet ()

Ĝiro-nro: HU60 1020 5000 0137 5239 0000 0000

SWIFT: OKHB HUHB K & H Bank, H-1051 Budapest, Vigadó tér 1.

aŭ al la konto **kelk-p** de KELI ĉe UEA ()

Dato:..... Subskribo:.....

Kongresaj kotizoj

Pageblaj en hungaraj forintoj (Ft) aŭ euroj (EUR)

Tarifo A: Ĉiuj landoj sen B.

Tarifo B: Eŭropa Unio (stato 2003) Skandinavio, Japanio, Svislando, Nord-Ameriko, Korea Resp.

Aliĝ-kotizo (ne repagebla) por ĉiu persono pagenda antaŭ kongreso

ĝis 31 12 2004 **A:** 20,- EUR **B:** 40,- EUR

ĝis 31 03 2005 **A:** 30,- EUR **B:** 50,- EUR

ĝis 30 06 2005 **A:** 40,- EUR **B:** 60,- EUR

Gejunuloj malpli ol 25-jaraĝaj ĝuas 50% rabaton de la koncerna kotizo laŭ grupo/ periodo.

Kongresa kotizo pagenda en la kongresejo (inkluzivas tranoktojn, manĝojn kaj ekskursojn)

A: 150,- EUR **B:** 250,- EUR

Krompago por unulita ĉambro: + 50,- EUR

Krompago por NE membroj de IKUE/KELI: + 20 EUR

Gejunuloj:

A: 100,- EUR **B:** 150,- EUR

Grava atentigo! La menciitaj kotizoj inkluzivas neniun asekuron.

Ĉiu kongresano por kongresaj tagoj prizorgu por si la asekuron en sia lando.

La aliĝon oni traktos kiel validan post ricevo de aliĝ-kotizo.

Aliĝ-kotizon oni povas sendi al banka konto:

Párkányiné Kaszab Erzsébet

Ĝiro-nro: HU60 1020 5000 0137 5239 0000 0000

SWIFT: OKHB HUHB

K & H Bank, H-1051 Budapest, Vigadó tér 1.

Aliĝoj al:

KASZAB Erzsébet, H- 1117 BUDAPEST, Karinthy F. út 5.

Informoj pri la 17-a Ekumena Kongreso:

Perletere: Irén BAGI, H- 1201 BUDAPEST, Baross u. 54/B

E-mail: farkas-tatar_eva@externet.hu

Piliscsaba

Ĝis la 10a de februaro 2005 jam aliĝis:

01. sac. KRONENBERGER Albrecht	DE	65. s-ro KLUMPAR Alois	CZ
02. s-ro ŠVÁČEK Miloslav	CZ	66. s-ro BERVELING Gerrit	NL
03. sac. KÓBOR Lajos	HU	67. s-ro KEPENCAY Tibor	SK
04. s-ino MASTALINSKA-PYDA Maria	PL	68. s-ino DEPECKER Tereza	FR
05. s-ino BARANSKA Zofia	PL	69. s-ino PERÉMI Erzsébet	HU
06. s-ino KUBICKA Mirosława	PL	70. s-ino STUDENÁ Pavla	CZ
07. s-ino BIRKELBACH Ilona	CZ	71. s-ro STUDENÝ Jiří	CZ
08. sac. PLACHA Stanisław	PL	72. f-ino STUDENÁ Pavla	CZ
09. s-ino PÁRKÁNYI-KASZAB Erzsébet	HU	73. f-ulo STUDENÝ Jiří	CZ
10. s-ino ILKOVÁ Hana	CZ	74. f-ulo STUDENÝ Vojtěch	CZ
11. s-ino LATA CZ Helena	PL	75. s-ro CHODNÍČEK Jaroslav	CZ
12. s-ro SARANDREA Carlo	IT	76. s-ro SULAK Adam	PL
13. s-ro DAMINELLI Giovanni	IT	77. s-ro KOVAŘÍK Jan	CZ
14. s-ino BUDINSKÁ Drahomíř	CZ	78. s-ino KOVAŘÍKOVÁ Zita	CZ
15. s-ro KOVÁŘ Jan	CZ	79. s-ro SOROSINA Felice	IT
16. s-ro BALCZER János	HU	80. s-ino BERTORELLE Mariolina	IT
17. s-ino FARKAS-TATÁR Éva	HU	81. s-ro CONTI Giovanni	IT
18. s-ino BAGI Irén	HU	82. s-ro MONTAUT Luciano	IT
19. s-ro BIRTA Szabolcs	RO	83. s-ro MASOERO Leonardo	IT
20. s-ino RÁCZKEVY EÖTVÖS Ágnes	HU	84. s-ino NOVOTNÁ Zdenka	CZ
21. s-ino STAMM Sieglinde	A	85. f-ino SPOUCHALOVÁ Helena	CZ
22. s-ro GAILLARD Samuel	FR	86. f-ino NOVOTNÁ Iveta	CZ
23. s-ro ÁRADSSON Bengt Olof	SE	87. f-ino SÁDLIKOVÁ Eliška	CZ
24. s-ino BÁNÁTI Katalin	HU	88. f-ino PAVLISOVÁ Denisa	CZ
25. s-ro SOMHEGYI Zoltán	HU	89. f-ino JANOUŠKOVÁ Nikola	CZ
26. s-ro POLNICKÝ Pavel	CZ	90. f-ulo JANKOVSKÝ Jan	CZ
27. d-ro SZEMÖK Balázs	HU	91. f-ulo ŘEHÁK Aleš	CZ
28. s-ino LÁSZLÓ Mária	RO	92. s-ino MORACCHIATO Elsa	IT
29. s-ino SUDÁR Sarolta	HU	93. s-ino TRUSSARDO Francesca	IT
30. s-ino REHM Britta	SE	94. s-ino FARKAS Éva	RO
31. s-ino STAMPF Margit	HU	95. s-ro FARKAS Antal	RO
32. dr-ino MÓGOR Ilona	HU	96. s-ino POPOVICIU Eugenia-Ecaterina	RO
33. s-ino TOMASOVIČOVÁ Maria	SK	97. s-ro DUDICH Endre	HU
34. s-ino KOMLÓSI Alica	SK	98. s-ino van DIJK Els	NL
35. s-ino SATUROVÁ Magda	SK	99. f-ino van DIJK Ingeborg	NL
36. s-ro SZÉP Attila	HU	100. s-ro COUSSON Philippe	FR
37. f-ino KŐSZEGVÁRI Katalin	HU		
38. f-ino TÓTH Regina	HU		
39. f-ulo TÓTH Dániel	HU		
40. f-ulo ROKOB Balázs	HU		
41. sac. ZIELONKA Jozef	PL		
42. s-ro VENCL Jiří ing.	CZ		
43. s-ino SACHA Alicja	PL		
44. s-ino LIGEZA Lidia	PL		
45. s-ro AHLRÉN Åke	SE		
46. s-ino PELCLOVÁ Bohuslava	CZ		
47. s-ino TUINDER Vera	NL		
48. s-ro TUINDER Jacques	NL		
49. sac. PLATEK Stanisław	PL		
50. s-ro KRÜGER Siegfried	DE		
51. s-ino RAMZA-RADLOWSKA Anna	PL		
52. s-ino SZOSTAK Stanisława	PL		
53. s-ino SLIWINSKA Stanisława	PL		
54. s-ino PROSTÁCKA Adela	PL		
55. s-ino RZANY Janina	PL		
56. s-ino WOLSKA Renata	PL		
57. s-ino MAZUR Teresa	PL		
58. s-ino KOZEK Krystyna	PL		
59. s-ino TÁMULY Éva	HU		
60. s-ro KANTELE Olavi	FI		
61. s-ino LÁSZAY Anna	HU		
62. s-ino STOYANOVA Ivanka	BG		
63. d-ro NOSKE Gottfried	DE		
64. s-ino KLUMPAROVÁ Marie	CZ		

KRISTNASKA CELEBRADO EN AŬVERNJO

Samuel GAILLARD

La 11an de Decembro 2004 en Clermont-Ferrand [Klermon-Feran], ĉefurbo de la franca regiono Aŭvernjo, okazis tre nova kunveno en la protestanta kaj evangelika historio de Aŭvernjo. Mi sukcesis organizi celebradon pri Kristnasko esperantlingve! Mi petis permeson uzi la kunvenejon de la 'Eglise Protestante Evangelique' (EPE: Eklezio Protestanta Evangelika), kiun mi bone konas, kaj mi invitis geamikojn partopreni en tiu celebrado. Mi informis ĉiujn protestantaj kaj evangelikajn komunumojn de Clermont kun ĉirkaŭaĵo (reformitan, baptistan, pentekostan, adventistan, karismatikan kaj aliajn) kaj la Esperanto-klubojn. Krom mia familio, ne estas Esperanto-parolantaj legantoj de la Biblio en Aŭvernjo (mi imagas) ; do mi preparis tiun celebradon kun samtempa traduko al la franca. Por tiu parolata traduko mi petis helpon al klubanino, kiu estas katolika kaj tre volantema por helpi al tiu celebrado.

Do sabaton la 11an inter 20h30 kaj 22h, kunvenis

” ĉar ŝi volis scii 21 personoj
kia povas esti en la kun-
'meso' en venejo de la
Esperanto. EPE. Miaj

grandaj filinoj nombris la ĉeestantojn, ĉar antaŭe ili diris al mi ke neniu venos al tia

celebrado, sed por helpi sian patron ili mem partoprenos. Ĉiuj partoprenantoj havis en la manoj papereton du-lingvan (A4-formatan falditan), preparitan de mi, sur kiu estis la kantoj, la programo kaj “miaj unuaj vortoj en Esperanto”.

Kompreneble mi mem gvidis la celebradon, kaj mi multe parolis. Mi dankis la ĉeestantojn, la akceptantojn, la EPE-n, kaj ankaŭ la asociojn FEEL (Franca Evangelia Esperanto-Ligo) kaj KELI, kiujn mi prezentis al la

” okazis tre nova kunveno en la protestanta kaj evangelika historio de Aŭvernjo

aŭskultantoj. Mi parolis pri la diversaj kongresoj, pri la lasta de Ĉeĥio, pri la lingvo Esperanto, pri ĝia kreinto Zamenhof. Ĉefe mi dankis Dion kaj Jesuon, kiu estis inter ni laŭ Mateo 18.20. Sed por aŭdigi aliajn voĉojn, mia edzino legis la 'Patro nia'-n, kaj mia filo (10-jara) legis kelkajn versiklojn de Luko 2. Kelkaj francaj partoprenantoj legis la samajn tekstojn franc-lingve; tiamaniere la klubanino tradukanta ne estis sola parolanta.

Dank'al ADORU ni kantis 6 kantojn: 207, 222, 214, 593, 404 kaj 213. Plurajn semajnojn antaŭe, mi estis doninta fotokopiojn de la muziko kaj teksto al Dominique [Dominik], pianistino de EPE, kiu preparis ilin, kaj estis preta pian-ludi: ŝi ne parolis, sed

multe helpis per la muziko. Mi preparis travidaĵojn por projekcii la tekstojn sur la muron: do ĉiuj povis legi, kaj provi kanti, ĉar la muziko de tiuj kantoj estas famkonataj, krom la 404; do ni lernis tiun kanton.

Tiu kunveno estis do sukceso. Venis pluraj personoj kiujn mi ne konis antaŭe, ekzemple studenton pri agrikulturo kiu komencis lerni Esperanton antaŭ 6 monatoj: li estas katolika. Venis ankaŭ virino, kun filino kaj bofilo, kiuj estis komprenantaj Esperanton, ĉar ŝi volis scii kia povas esti 'meso' en Esperanto. La plej mirinda estis la sekva fakto: duamikinoj de miaj filinoj bonege komprenis "miajn unuajn vortojn en Esperanto" kaj komencis paroli kun miaj filinoj mallongajn frazojn; ili konstatis ke Esperanto estas facile lernebla. Tiuj knabinoj estas filinoj de du el la plej gravaj plejaĝuloj de la komunumo.

Do se vi vizitos nian regionon iun tagon, estu certa ke vi povas viziti tiun eklezion EPE, kie vi povas paroli

Esperanton, renkonti aliajn gefratojn, informi pri via propra eklezio aŭ komunumo ktp: mi mem povas peri. Povus okazi diservo esperantlingve. Ankaŭ tion oni konstatas, ke Esperanto estas ponto inter la lingvoj kaj nacioj, KELI estas ponto inter kristanoj de diversaj landoj, kaj FEEL estas ponto inter protestantoj kaj esperantistoj.

La klubanino kiu tradukis parolante estis tre kontenta pri tiu sperto, kaj ŝi kaj mi esperas organizi similan celebradon pri Pasko, se ni havas sufiĉe da energio. Mi promesis helpi ŝin, kiam ŝi organizos katolikan meson, sed ŝi diris al mi ke ŝi bezonas esperante-parolantan pastron por tio, kaj en Aŭvernjo ... ĉu ekzistas? Do KELI kaj IKUE havas ankoraŭ grandan laboron: venu helpi nin! Antaŭan dankon!

Se vi volas la paperojn de tiu celebrado (programon, afiŝon ktp), informu min: mi sendos ilin per poŝto. Skribu retletere al:

goelano@infonie.fr

La Tero estas nur unu lando kaj la Homaro ĝiaj civitanoj !!
A Terra é um unico pais e a Humanidade os seus cidadaos !!
De Aarde is één enkel land en de Mensen zijn haar bewoners !!
Die Erde ist ein einziges Land und die Menschheit ihre Bürger !!
La Terra e un unico paese e l'Umanita suoi cittadini !!
La Terre est un seul pays et l'Humanité ses citoyens !!
La Tierra es solamente un pais y la Humanidad sus ciudadanos !!
The Earth is just one country and the Humanity its citizens !!

Ĉu ni komuniku retletere?

Fonto: <http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo/>

Bengt Olof ÅRADSSON


Pluraj el ni komencis uzi la modernan teknikon, negrave nian aĝon. Ĝi faciligas la komunikadon kun geamikoj tutmonde, tamen en nia komenco certe ĝi kreis ankaŭ iom da

ekscitaĵo. Ĉu vi ankaŭ lernis la plej kutimajn vortojn? Ĉi-sube estas kelkaj ekzemploj. Sekvontnumere mi donos dek novajn. Sentu vin tute libera proponi vortojn kaj esprimojn!



interreto	Esperantigita nomo de “Internet”, la plej granda el la mallokaĵoj.
retletero	Persone adresita mesaĝo sendita per komputila reto.
ekrano	Laŭeble ebena surfaco uzata por vidigi bildojn per speciala tehniko (ekz. televida, komputila ekrano).
klavaro	La plej komuna speco de enigilo komputila, kies formo imitas la tajpilan klavaron.
enigi	Transmeti datumon en komputilon (ekz. enigi la pasvorton).

klaki	Sendi signalon al komputilo per tujsekvaj premo kaj relaso de musa butono aŭ klavo (kultime akompanataj de mallaŭta klaketo).
muso	Enigilo kiun la uzanto movas sur horizontala ebena (ekz. sur sia tablo, prefere kovrita per musmato), tiel movante muskursoron sur la ekrano de sia komputilo.
tiparo	Sortimento da prestipoj (iam temis pri plum-baj prestipoj, nun oni aplikas tion al la komputilaj tipardosieroj).
TTT-paĝo	Mallongigo de “Tut-Tera Teksaĵo“, sistemo en la interreto (komparu www). Aro da interligitaj aferoj. Ekz. http://www.chez.com/keli/
Spam-mesaĝo	Reklama aŭ propaganda mesaĝo distribuata al celatoj sen ties konsento.



'La Mastro de l'Ringoj' kaj la Fido Kristana

el la katolika gazetaro novzelanda
de Pastro Edmund LITTLE
traduko de Mike LEON

Kiam Peter Jackson komencis filmi 'La Mastron de l'Ringoj' de J. R. R. Tolkien en Nov-Zelando, intensa estis la furoro. Serĉante la plej lastajn novaĵojn, spionoj ĉasvadis ĉe liaj scenejoj. Bolis retpaĝoj scivole pri la filmo kaj ĝiaj aktoroj. Malofte tamen oni publike menciis, ke Tolkien estis pia katoliko kaj ke lia verko reflektas lian fidon. Al sacerdota amiko li skribis:

"Kompreneble 'La Mastro de l'Ringoj' estas verko fundamente religia kaj katolika; nekonscie tiel en la komenco, sed konscie tiel en la revizio".

La rusoj konsciis

Enloĝantoj de la ateisma Sovetunio ekkonsciis pri la spiritaĵoj de la romano longe antaŭ okcidenteŭropanoj. Multaj legis ĝin en formo de 'samizdat'. Tiu estis sistemo per kiu iu posedanto de malpermesita aŭ suspektata libro kopiis ĝin mane aŭ skribmaŝine kaj poŝte disvastigis la kopion al aliaj kiuj distribuis ĝin plu.

Iuj trovis ke, pro la elfoj kaj drakoj en la romano, oni povas deklari ĝin al la doganistoj kiel "fabelon" kaj tiel sekure importi ĝin tra neinteligenta cenzuro. Alpinglante la etiketon "fabelo" sur la verkon de Tolkien, iuj okcidentaj kritikistoj malestimis ĝin kiel "nerealisman" kaj "eskapisman", malindan je atento de maturaj komen-

tariistoj, kiaj ili.

Iu erudiciulo akre rimarkis, ke homoj estas precipe infanecaj kiam ili asertas sian plenumatecon, kio povus klarigi kial pornografia literaturo estas tre ofte kaj absurde nomita 'adoltula'.

Efektive, feoj tute mankas en la verko.

Ĝi havas elfojn, nanojn kaj hobitojn, sed tiuj ne estas belaj, brilorajaj aŭ kuriozaj kiel en la verkoj de (aŭtoro de infanlibroj) Enid Blyton aŭ Walt Disney. Ĉiu



grupo estas portretita detale kun siaj bone difinitaj lingvo, psikologio kaj kulturo. Vere, ili estas pli realismaj ol multaj homoj supoze el 'reala vivo' kiujn portretas modernaj fikcio kaj filmoj.

La vera ĝeno por modernaj sekularaj kritikistoj estas tiu spiriteco kiu plaĉis al ruslandaj legantoj. Laŭ Tolkien, Mez-Tero estas mondo nek senutila nek hazarda. Ĝi havas Kreinto-Dion kiu decidas celon kaj destinion por siaj kreitoj. Ili povas libere akcepti aŭ malakcepti la moralan ordon de la Kreinto. La romano multe portretas la krizon kiun kaŭzas tiuj, kiuj malakceptas ĝin.

Mankas eskapismo ĉi tie se, per eskapismo, la malamikema kritikisto volas diri fuĝon de severa realo. La

fantazio de Tolkien servas kiel spegulo por reflekti realon - severan aŭ male - al liaj legantoj tiel, ke ili rekonas tiun saman realon en sia mondo.

Bono kaj malbono

Tolkien emfazas la malĝojan veron, ke malbono povas venki eĉ la grandulojn kaj la bonulojn. Kiel Elrond rimarkis al Boromir: "... *nenio estas malbona en la komenco. Eĉ Sauron ne estis tiel*". Elrond asertas la kristanan principon, ke la kreaĵaro estas bona. Sole malbonas koruptiĝo de boneco kaj ribelo kontraŭ ĝi. Malbono estas parazita kaj negativa, sed negativa forto povas tamen posedi grandan kaj teruran potencon.

Kiel Lucifero, la Malluma Lordo Sauron estis iam granda spirito en la servo de la Kreinto. Koruptite de potenco kaj avareco, li celis regi kaj ne servi. Saruman, la Ĉef-Sorĉisto, ankaŭ



estis unu el la anĝelaj spiritoj de Valinor. Sendite al Mez-Tero por kontraŭstari la potencon de Sauron, ankaŭ lin koruptis la allogo de potenco kaj riĉeco. Li

devus direkti la batalon kontraŭ la fortoj de malbono. Li tamen falas el graco kaj aliĝas al tio, kion li devus kontraŭstari. Judaso estis apostolo. Nia historio estas plena de idealistoj kiuj komencis per admirindaj intencoj kaj finis kiel demagogaj murdantoj.

Mordor, la reĝlando de Sauron, estas

diktaturo kies sklavigitaj enloĝantoj estas senkompataj kaj kruelaj. Kaptitoj devas elteni longigatan lertan torturon de menso kaj korpo antaŭ sperti angoran morton. Por enloĝintoj de la soveta Gulag aŭ naziaj koncentrejoj ĉi tiu estas realismo, ne 'eskapismo'. Tute malpuriĝis kaj ruiniĝis la tero kaj aero de Mordor. Ĉi tiu ankaŭ povas ŝajni realisma al tiuj, kiuj vidis la riveron Danubon venenitan de cianido aŭ vidis la detruon de arbaroj cele al la tutmonda ekonomio. Mordor en "reala" vivo prenas multajn formojn.

Eskapisma

Tolkien atentigas, ke lia verko estas eskapisma ĉi tiu-sence: ke ĝi portretas aferojn, lokojn kaj homojn de kiuj iu ajn mense sana persono volus fuĝi. Kiu dezirus restadi en Mordor? Sole la gardistoj kontraŭas la eskapon de la senkulpaj kaj subpremataj kaptitoj.

Eskapi tamen ne estas la sama kiel fuĝi de respondeco. Gandalf forlasas vivon feliĉegan en Valinor por eniri Mez-Teron kaj kontraŭbatali la potencojn de malbono. Li mortas kaj releviĝas de morto. Frodo kaj Sam liberigas Mez-Teron de la potenco de la Malluma Lordo per forlaso de la sekureco ĉehejma, kaj eniras la turmentojn de Mordor. Kristanoj rekonas multajn eĥojn de la Evangelioj. Kristo elverŝis sin, kiel Paŭlo diras, kaj fariĝis kiel homoj estas (kp. Filemono 2:7).

En li, Dio eniras en falintan mondon. Lia eskapo el tiu mondo estas per sufero, morto kaj releviĝo. Li petas siajn disĉiplojn uzi la saman eskapovojon por sekvi lin. Ankaŭ ili devas

ekpreni sian krucon.

Tolkien ankaŭ emfazas la absolutan realecon de malbono sed asertas ĝian finfinan vanecon. (Kelkaj el liaj males-timantoj, kvankam ne agnoskantaj malbonon aŭ moralajn valorojn, ŝajnas vole agnoski la kvazaŭan vanecon de vivo ĝenerale.)

En la malhelo kaj haladzo de Mordor, Sam subite ekvidas stelon. La penso penetras lin, ke fine *“la ombro estas io nur malgranda kaj kelktempa: preter ĝia atingo estas lumo kaj alta belo por ĉiam”*.

Kristanismo ankaŭ emfazas kaj la realecon de malbono kaj ĝian finfinan malvenkon. Jesuo petis al siaj disĉiploj ke ili ne timu, ĉar kvankam ili spertos malfacilon en falinta mondo fikstenata de peko kaj suferado, tiun mondon li jam venkis. La malhelo nek venkis lin nek enfermis liajn disĉiplojn kiuj povas trovi preter ĝi lumon kaj altan belon. La Evangelio proklamas ke la humiluloj heredos la teron. Estas la humilaj kaj negravaj hobitoj kiuj savas Mez-Teron de



malbono, dum la saĝuloj kaj la fieruloj ludas sekundaran rolon.

Fido kaj Espero

Fido kaj espero estas plektitaj en la teksaĵon de la romano. Plimulto da legantoj agnoskas tion kaj dankas, simpatiante kun historio bone rakontita de majstra metiisto. Male, optimismon kaj bonajn rakontojn malŝatas iaj literaturaj kritikistoj kiuj ankaŭ plendas, ke la romano ne havas la seksan eksplicitecon kiu helpus fari ĝin taŭga por plenaĝuloj. Vere, *'La Mastro de l'Ringoj'* diras nenion pri amo sed ja donas grandajn komprenojn pri amo. Ankaŭ tiu estas valoro evangelia kiun oni ne devus forlasi por la tuta "adolta" literaturo en la mondo!

El Wel-com, la monata gazeto de la Katolika Ĉefdiocezo de Wellington, Nov-Zelando. Marto 2000.

"Saruman" de Tony Galudi. "Gandalf" de John Howe.

"Sam kaj Frodo" de Ted Nasmith.

represita kun permeso

MI ESTAS KIU ESTAS — PARTO 1

(Eliro 3:13–15; Johano 8:58)

pastoro Bayo AFOLARANMI

La studo de hodiaŭ enkondukas la sep "MI ESTAS"-diraĵojn de Jesuo Kristo en la Evangelio laŭ Sankta Johano. Ĉi tiuj diraĵoj kaj komunikadoj temas pri la personeco kaj dieco de Jesuo Kristo kaj asertas

sen dubo, la neneeban veron: la diecon de Jesuo Kristo.

Enkonduko

Kiel ĉi tiuj diraĵoj originis? El la respondo de Dio al Moseo dum li ŝajne

evitis la alvokon de Dio (Eliro 3). Unue, li diris ke li ne estis inda je la alvoko (versiklo 11). Kiam Dio certigis lin pri Sia subteno (versiklo 12), li donis la duan ekskuzon. Li demandis: “*Jen mi venos al la Izraelidoj, kaj diras al ili: La Dio de viaj patroj sendis min al vi; tiam ili diras al mi: Kio estas Lia nomo? Kion mi diru al ili?*” (Eliro 3:13).

Kio estas en nomo?

Kio estas en nomo? Juliet en ‘Romeo and Juliet’ de Shakespear (Ŝekspiro) demandis ĉi tiun klasikan demandon. En Afriko, nomoj kutime priskribas la karakteron kaj la cirkonstancojn de ies naskiĝo kaj deveno. La okcidenta mondo ankaŭ havas preferon kaj valoron al nomoj. La nomo de homo/aĵo en la Sankta Biblio ĉiam malkaŝas la cirkonstanco(j)n de la homo/aĵo havanta tiun nomon, aŭ la kredon de liaj/ŝiaj gepatroj. Ekzemple, Josuo signifas Jehovo estas savo; Jesaja kaj Jesuo signifas Jehovo savas; Nabal signifas malsaĝeco (1 Samuel 25:25) kaj Barnabas signifas filo de konsolo (Agoj 4:36). Tial Moseo ne iris tre fore demandante la nomon de la Dio kiu parolis al li. Malgraŭ tio, Dio ne malkaŝis Sian nomon al iu ajn antaŭe.

La nomo de Dio

Dio respondis al la demando de Moseo dirante al li, “MI ESTAS, KIU ESTAS”, aŭ simple, “MI ESTAS” (la Estanto) (versiklo 14). Ĉi tiu estas vortludo pri la Hebrea vorto por Javeo. Ĝi havas rilaton kun la verboj ‘esti’ kaj

‘ekzisti’. Tial, Dio parolis pri Si kiel la mem-ekzistanta Estanto. La nomo esprimas du de la karakteroj de Dio — la dependandan kaj la fidindan Dion. Li deziras la plenan fidon de Siaj homoj (vidu: versikloj 12, 15).

Jesuo aplikis la nomon

Jesuo Kristo aplikis ĉi tiun nomon al Si okfoje en la Evangelio laŭ Sankta Johano. Unu el tiuj kazoj estas klarigita ĉi tie. La kazo (8: 58) estis komencita de alia kazo (en versiklo 12), kiu okazigis varman dialogon inter Jesuo kaj la fariseoj. La dialogo temas pri la atesto de Jesuo Kristo (versikloj 12–30), la patro de la judoj (Abraham aŭ la diablo) (versikloj 31–47), kaj la aserto de Jesuo pri Si (versikloj 48–59). La judoj pridemandis Jesuon pri Lia atesto: “*Via patro Abraham ĝojegis vidi mian tagon*” (versiklo 56). Respondante, Jesuo deklaris, “*Antaŭ ol naskiĝis Abraham, mi ekzistas*” (versiklo 58). Gramatike, ĉi tiu frazo estas malprava, sed teologie, ĝi estas prava. Per ĉi tio, Jesuo asertis Sian pre-ekzistadon kaj Sian egalecon kun Dio kiu parolis kun Moseo (vidu: Filipianoj 2: 6). La judoj komprenis Lin kaj volis ŝtonmortigi Lin pro tiu aserto.

Konkludo

Hodiaŭ la fakto alfrontas nin. Kiu estas Jesuo Kristo? Li estas “MI ESTAS, KIU ESTAS”, la memekzistanta kaj ekzistinta Dio kiu meritas nian adoron, ne nian ‘ŝtonmortigon’. Ĉu vi kredas ĉi tion? Ĉu vi adorservas Lin kiel Dion?

□

Informoj

Kontaktdeziro

Bonvolu skribi al:
Mateo Kasongo Diemo
(mateokd@yahoo.fr)
en Kongo, kiu prepariĝas esti
pastoro kaj estas juna kaj sola
esperantisto en sia urbo.
Mi informis lin pri la ekzisto de
KELI, sed li ŝatus havi kontaktojn
kun multaj KELI-anoj.

Dankon.
Samuel GAILLARD



Trudi Aebersold

Bedaŭrinde mi devas
informi vin, ke mortis Trudi Aeber-
sold la 9-an de novembro 2004 en
Winterthur. Bedaŭrinde ŝi havis tre
strangan muskolan malsanon kaj
mortis nur 60 jaraĝa! Ŝi estis dum
15 jaroj membro de KELI, ankaŭ
partoprenis la kongreson en Bienen-
berg. Ŝi tre ŝatis la diversajn
lingvojn kaj ofte vojaĝis ekster-
landen. Multege ŝi ankaŭ laboris
senpage por la eklezio.

Ruth van PUIJENBROEK

Du anoncoj de la sekretario:

1 - La sekretario petas tiujn
membrojn kiuj partoprenos tiun ĉi
jaron en la Universala Kongreso
en Litovio, ke ili informu la
sekretarion Els.

2 - La sekretario petas la landajn
reprezentantojn kaj sekciojn, ke ili
sendu mallongan raporton al ŝi.

Ŝi devas prepari la jarraporton
kaj la membroj certe interesiĝos pri
la vivo de la KELI-anoj loĝante en
multaj landoj en kaj ekster Eŭropo.

kore salutas, Els

Gekaraj,
mi intertempe aliĝis al la reta
diskutgrupo 'Per-esperanto-religio'
kaj volas atentigi vin je tio. La grupo
estas multreligia kaj ne nur kristana.

Salutas korege
Siegfried

<http://groups.yahoo.com/group/per-esperanto-religio/>

Ĉar vi elektis

el Harp' 116

1. Ĉar Vi e - lek-tis, vi-vi en mal-ri-ĉec'

2 Ĉar Vi obeis
ĝis la ekstrema sort',
surkruca morto,
konas ni venkon,
scias pri grand-potenc',
konas ni Dion.

vi-von ho - me-can, ĉar Vi ne kro-nis

3 Ĉar Vi sobiris
al homoj en sufer',
al la pekintoj,
scias ni, ke ne
solaj iradas ni;
konas nin Dio.

Vin per Di - e - ca glor', ko-nas ni

4 Tial proklamos
ĉiuj vunditoj kaj
ĉiuj mortontoj,
ĉiuj pekintoj
kun tuta sanktular'
Kriston Sinjoro.

Di - on. — jo - ro. —

5 Tial konfesos
mondoj kaj kreitar',
ĉio estinta,
nuna, venonta,
ĉio en unuec'
Kriston Sinjoro

kp. Flp 2:6 -11

FÖR ATT DU INTE - SPB 38 b - M: Börge Ring 1975 - sveda T: Olof
Hartman 1970 - E: Åke Ahlrén 2002/2004, kun afablaj permesoj